



Saluton!

Mi estas Félix el Madrido, Hispanujo, kie mi naskiĝis en 1969.

Mi esperantiĝis en 1997 pere de kurso gvidata de Hispana Esperanto-Federacio kaj en la jaro 2000 komencis partopreni en internacia E-renkontiĝoj, kiuj permesis al mi ĝui la gravecon de Esperanto kiel komunikilo por koni aliajn kulturojn: ekzemple, dum la somero de la jaro 2001 mi faris dumonatan voaĝon tra Eŭropo uzante Pasportan servon kaj partoprenante en kelkaj aranĝoj kiel IJF en Strasburgo kaj IJS en Szombathely (Hungario).

E-Movade, mi estas membro de la loka E-asocio de mia urbo (Madrida E-Liceo), de la landa asocio (Hispana E-Federacio, HEF), de UEA kaj de SAT kaj SATeH (SAT en Hispanio). Fakte mi estas Sekretario de la Estraro de HEF ekde 2008 ĝis nun, do mi devas zorgi pri la organizado de jaraj kunvenoj por aprobi kontojn, buĝetojn, agadon, ktp kaj redakti protokolojn kaj aliajn asociajn dokumentojn. Aliflanke, mi kutime helpas la organizantojn de E-renkontiĝoj en la Iberia Duoninsulo (ekz.: Hispanaj Kongresoj 2005, 2009, 2010, 2011, 2012 kaj 2013; Iberiaj Renkontiĝoj 2007, 2010 kaj 2013; SAT-Kongreso 2013) kaj kelkfoje kunlaboras farante prelegojn pri Ornitologio (HK 2005 kaj IRo 2007) kaj pri Socia kaj Solidara Ekonomio (HK 2011 kaj 2014, SAT-Kongreso 2013). Mi ankaŭ interesiĝas en la instruado de Esperanto kaj mi pensas, ke tio estas serioza tasko bezonata de trejnado ĉar kelkfoje oni instruas E-on sen metodo kaj eĉ sen profundan konon de la lingvo: jen motivo por studi IS ĉe la UAM.

Miaj antaŭaj studoj estas tre diversaj: mi studis Biologion antaŭ 20 jaroj kaj Kulturan Antropologion antaŭ tri, do mi havas titolojn en la du grandaj fakoj de la homa sciado, naturaj sciencoj kaj homaj sciencoj (por kelkaj homoj tio estas neakordigebla!). De ĉiam mi interesiĝis pri lingvistiko, do, la Interlingvistikaj Studoj estas tre bona ebleco por plenumi tiun revon.

Profesie mi eklaboris kiel naturmedia teknikisto antaŭ multaj jaroj, sed de la jaro 2002 mi laboras kiel administranto en iu labor-kooperativo. Dum la jaro 2013 mia kooperativa firmao devis malplialtigi la tagan labordaŭron pro la ekonomia krizo, kaj tiu signifis malplialtigi ankaŭ la salajron... Tamen, tiu situacio liveras al mi sufiĉan da tempo por fari aliajn interesajn aferon, kiel studi IS en Poznano, kvankam por la vojaĝoj en Pollandon mi devas fari specialan ekonomian strebon.

Aliflanke mi spertas pri Korporacia Sociala Respondeco kaj Socialaj Bilancoj kaj mi kunlaboras kun du projektoj kiel sociala konsilanto: Coop57 (financa kooperativo) kaj "Mercado Social de Madrid" (Madrída Sociala Merkato), ambaŭ estas projektoj de la sociala movado de mia urbo kaj la du postenoj estas tute volontaj. Mi ankaŭ agadas ĉe la hispana sociala movado "15M", ĉefe partoprenante en la sociala agado en mia rezidad-kvartalo de Madrido (Kvartalo "Usera"). Mi ĉiam klopodas enkonduki Esperanton en tiuj socialaj agadoj ĉar mi pensas, ke la rolo de nia Internacia Lingvo daŭre gravas por la „Lingva Demokratio“.

Do, pere de via helpo mi intencas sukcese plenumi la postgradon de IS ĉe Poznan, kaj poste apliki tiun konon instruante E-on pere de la E-movadaj asocioj kaj eĉ ekster-E-movada pere de mia agado ĉe aliaj socialaj movadoj.

Dankon kaj mi esperas renkontiĝi kun vi en Esperantujo!

Félix M. Jiménez.